

\*\*\*\*\*

## INSTRU-CIRKULERO 2013/02 (majo 2013)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

\*\*\*\*\*

Karaj Gekolegoj,

Jen kelkaj novaĵoj, aktualaĵoj

### 1. Memorigilo pri invito al jarĉefkunveno:

#### Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung

Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung im Rahmen des 90. Esperanto-Kongresses

(<http://www.esperanto-nuernberg.de/e/eo/770063/main/gekextern>) in Nürnberg ein.

Diese findet am Samstag, den 18. Mai 2013 im Caritas-Pirckheimer-Haus CPH, Königstrase 64, 90402 Nürnberg, [www.cph-nuernberg.de](http://www.cph-nuernberg.de) statt.

Beginn ist um 13:45 Uhr.

Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erwartet daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

#### AGEI-jarĉefkunveno: dum GEK (17-20.05.2013) en Nürnberg

Dato de nia kunsido: 18.05.2013, sabato inter 13:45-14:45, loko: Caritas-Pirckheimer-Haus CPH, Königstrase 64, 90402 Nürnberg, [www.cph-nuernberg.de](http://www.cph-nuernberg.de)

Detaloj, aliĝeblo: <http://www.esperanto-nuernberg.de/e/eo/770063/main/gekextern>


(La Esperanto-grupo en Nürnberg estas la plej malnova Esperanto-grupo. Ĝi estis fondita en la jaro 1888, do nur unu jaron post la eldono de la unua lernolibro de Esperanto.)

Ni esperas je ĉies aktiva partopreno.

Proponata tagordo:

1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo. Elekto de protokolanto, kontrolo de laustatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Malŝarĝigo de la estraro
5. raporto pri la organizado de la 46a ILEI-konferenco.
6. pluaj aktivecoj kaj proponoj.
7. laborplano por la sekva agadjaro. Decido pri loko kaj dato de sekva jarĉefkunveno.
8. diversajoj

Koran bonvenon!



Zsófia Kóródy

AGEI-Vorsitzende

AGEI-prezidanto

### 2) KER-ekzamenoj

Atenton: pro manko de sufiĉaj kandidatoj por la samaj niveloj, ne okazos KER-ekzamenoj dum la GEA-kongreso en Nürnberg. En la kongresa programo tamen restos la 18an de majo inter 8:45-9:00 mallonga informprelego de Zsófia Kóródy pri KER-ekzamenoj.

- **la 8an de junio okazos la dua tutmonda KER-tago.** En Germanio ekzameno estos en Berlin.  
Detaloj ĉe <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/duapub>

- **dum la ILEI-konferenco (12-18 julio 2013 en Herzberg am Harz / Sieber)**

<http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de>

eblos trapasi la UEA/ITK KER-ekzamenojn en B2 kaj C1 niveloj. Ni nepre rekomendas ĝin, eluzu la eblon kaj akiru valoran atestilon pri via lingvokono. Bonvolu aliĝi ĝustatempe (ĝis fino de junio!)

### **3) 59a Studsesio 08.05.2013 - 12.05.2013**

Ein vielseitiges und interessantes Angebot mit ausländischen Teilnehmern erwartet Sie bzw. uns!  
vom

08.05.2013 (Mittwoch) 18:00 Uhr Esperanto-Klub

19:30 Uhr - 20:30 Uhr EGS-Mitgliederversammlung (JHV)

09.05.2013 (Himmelfahrtstag- Donnerstag) 13.30 Uhr ab ICH per Pkws nach Sieber, von dort

Wanderung auf den Großen Knollen (685m)

19:30 Uhr Heiteres Beisammensein im ICH

10.05.2013 (Freitag) 9:30 Uhr - 13:00 Uhr DEB-Weiterbildungsmodul, im ICH

Fachvorträge u.a. von: Yashovardan, Martin Ptasinski, Zsafia Korody, Ewa Kukielka,  
Peter Zilvar

15:00 Uhr SONDEREINLADUNG (gebührenfrei) durch die Stadtverwaltung ins  
Herzberger Schloss (mit Führung und Torte), nur für EGS-Mitglieder und Freunde  
sowie Gäste des Esperanto-Centro

Bitte bis zum 08.05.13 bei Peter Zilvar dazu anmelden! Danke!

19:00 Uhr Musik und Musikfilme im ICH

11.05.2013 (Samstag) ab 9:30 Uhr - 18:00 Uhr Weiterbildungsmodule (mit Pausen) im ICH

20:00 Uhr Gemütliches Beisammensein im ICH mit ausländischen Gästen

12.05.2013 (Sonntag) ab 9.30 Uhr - 13:00 Uhr Weiterbildungsmodule (im iCH)

ab 13:30 Uhr Internationaler Museumstag mit "Esperanto-Blitzkursen" und Information  
im Schlossmuseum

Bonvenon! Willkommen!

**4) Intensaj lingvokursoj: inter 05-12 de julio 2013** okazos en Herzberg...la Esperanto-urbo paralele en pluraj niveloj. La GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo garantias altnivelan instruadon kaj klerigadon. Pro la fakto, ke en la proksimeco al la Esperanto-Centro troviĝas la ESPERANTO HERBEJO, ekzistas senkostaj tranokteblecoj en tendoj. Superbazaro, la Esperanto-Centro / ICH, arbaroj kaj la bela lago Jues (por naĝado) troviĝas en kelkminutaj irdistancoj.  
Bv. noti la daton kaj bv. baldaŭ aliĝi.

### **5) Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg (ankaŭ sidejo de AGEI) prezentita en televidprogramo:**

La 2an de majo 2013 la konata televidokanalo "RTL Regional" elsendis je la 18a horo en la programo "Wissen X-akt" 6:27 minutan filmeton pri Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo, pri la biblioteko kaj arkivo de Esperanto-Centro, kie Peter Zilvar kaj Zsafia Korody rakontis pri Esperanto, pri libroj, gazetoj, agadoj kaj montris kelkajn interesajn objektojn el la riĉaj kolektaĵoj de Interkultura Centro Herzberg.

La televida teamo pretigis ankaŭ mallongan intervjuon kun urbestro Gerhard Walter kaj kun kelkaj gelernantoj, kiuj lernas Esperanton en la loka gimnazio. En la filmeto estas prezentataj Esperanto-servoj en la urbo kiel ekz. Esperanto-manĝokarto ĉe Döner-bufedo, dulingvaj ŝildoj, vojmontriloj, ktp. La filmo montras ankaŭ vidindaĵojn en Herzberg, ZEO-jn, ekz. la Zamenhof-monumenton, la Gießner-memorejon kun la Esperanto-placo ĉe la stacidomo de Herzberg.

La filmo estas videbla ĉe <http://www.rtlregional.de/player.php?id=23553>

Fotoj pri la televidteamo, resumo pri la evento ankaŭ ĉe <http://esperanto-urbo.de/blog.php>

## 6. 46a ILEI-Konferenco 12-18.07.2013

### Dua Komunikilo

Raporto, kelkaj novaĵoj pri la organizado de la 46a ILEI-konferenco (12-18.07.2013, Herzberg/Sieber)

**ALIĜOJ:** je la fino de la unua aliĝperiodo, la 31an de marto, estas jam 60 aliĝintoj al la konferenco el 25 landoj. Ni esperas, ke la nombro daŭre kreskos, ni petas la sekciestrojn alvoki la sekciajn membrojn, sendi komitatanojn al la kunsidoj, aktive varbi, informi inter la landaj membraroj, kolegaro, konatuloj kaj dissendi detalojn pri fakaj kaj distraj programoj, pri la metodika trejnseminario, pri multaj aliaj interesaj prelegoj, ktp.

Aliĝilo: <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/reg.php>

Mi sendadas la invitleterojn al tiuj, kiuj bezonos vizon, do bv. kontakti min (LKK) por trakti detalojn.

La listo de aliĝintoj kun laŭlanda statistiko estas legebla ĉe

<http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=27774578>

**KONFIRMILLO:** la konfirmiloj por la ĝis nun aliĝintoj jam estas pretigataj kaj LKK sendos ilin baldaŭ al ĉiuj kun komentoj, se estas malklaraĵoj, pagomankoj, ktp. Ĉe kelkaj aliĝintoj mankas al LKK ankoraŭ financa konfirmo pri la ricevo de la konferenckotizo kaj aliaj servoj, do ili nur pli poste ricevos la konfirmilon.

**PROGRAMO:** La detala laŭtaga - sed ankoraŭ provizora - programo estas legebla ĉe

<http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=77711413>, tio certe helpas al la komitatanoj kaj al ĉiuj aliaj por plani la partoprenon. Bv. rigardi, kompari viajn programelektojn kaj laŭ tio mendu ekskursojn, partoprenon en la bankedo, ktp.

Metodika trejnseminario: dankon al Katalin Kovats ([edukado.net](http://www.edukado.net)) pro la ofertata gvidado, tempoplanado, kiu bone harmonias kun la ceteraj programoj de la konferenco. Jam 12 personoj aliĝis. La detalan temaron bv. legi ĉi tie: <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=51903533>

Seminario pri ekzamenoj: Dr. Rudolf Fischer kaj Mireille Grosjean atendas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la internaciaj esperanto-ekzamenoj, taksas la temon grava kaj ŝatus spertiĝi resp. helpi la komparadon de la niveloj en la KER-ekzamenoj kaj en la UEA/ILEI ekzamensistemoj.

Fakprelegoj, prezentadoj: dankon al ĉiuj, kiuj jam ofertis interesajn temojn, edukajn, sciencajn, distrajn. Se iu ankoraŭ ŝatus aldoni prelegon, kontribuon, ktp., bv. kontakti LKK.

**EKZAMENO:** dum la konferenco okazos KER-ekzamenoj se estos sufiĉaj kandidatoj. Bv. aliĝi, vi povos akiri prestiĝan ekzamenatestilon en B2 aŭ C1 niveloj. Ekzamenoj okazos kaj en skriba kaj en parola formoj.

**EKSKURSOJ:** al belegaj kaj historiaj lokoj, al Göttingen, Hannover, al la Harz-montaro kaj Goslar LKK ofertas ekskursojn, urborigardadon. Bazaj informoj estas legeblaj ĉe <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=51903533>. Detaloj, fotoj sekvos. Mendu vian partoprenon frue!

**TRANOKTADO:** LKK provas plenumi ĉies deziron kaj mendi la hotelĉambrojn, feriodomojn laŭ tio. Hotelĉambroj por 32-38 EUR, feriodomoj por ĉ. 12-30 EUR. Mendu vian tranoktadon ĝustatempe, ke LKK povu helpi vin trovi la idealan solvon.

Se en la sendota konfirmilo vi ankoraŭ ne trovos indikon pri via tranoktloko, bv. pacience atendi, ni ne forgesis vian mendon sed ankoraŭ serĉas kunloĝanton aŭ la plej taŭgan disdonon de akireblaj lokoj.


Por junuloj ni ofertas tre bonajn partoprenkondiĉojn, favorajn tranokteblojn, eĉ senpage tendumi eblos en Herzberg. Ruldomoj havas apartan senkotizan parkejon.

**SALO 8:** la paralela programo de la junularo, la tn. Somera Arbara Lernejo por ĝemelurbaj lernantoj el Herzberg kaj Góra allogas ankaŭ eksterlandajn gejunulojn, do tiu ĉi ILEI-konferenco estos vere tia, kian indikas la ĉeftemo: io por ĉiuj generacioj.

**VOJAĜO** al Herzberg/Sieber: bv. kontakti LKK por helpi ellabori la plej favoran, taŭgan itineron, vetureblon en Germanio. Estas multaj rabatkotizaj trajnbiletoj kaj por individuoj kaj por grupetoj de 2-5 personoj.

Mi esperas, ke per tiuj informoj ni helpas kaj aliĝintojn kaj aliĝontojn. BONVENON!

Kun multaj salutoj,



Zsófia Kóródy  
prezidanto de AGEI